O'Keeffe gives interesting profiles of other Russian Esperantists during this period, for example Vasilij Eroshenko, the blind anarchist poet who learned Esperanto beginning in 1908, traveled to Britain in 1912, and then to Japan in 1914, where he spent five years and became something of a celebrity. She also describes Captain Postnikov, a respected military officer who became a leading Esperantist around 1907. Postnikov was the first president of the Russian Esperanto League, and worked tirelessly to gain official support for Esperanto from members of the royal family and Czarist bureaucracy.

1914 brought the First World War and, with it, the first *Universala Kongreso* to be cancelled. Like many other Esperantists, Zamenhof was already en route to the UK in Paris, and then suddenly had to find a way home through countries which viewed him as an enemy. O'Keeffe tells the story of a Russian who arrived in Paris early and documented meetings with many other Esperantists even before the UK was due

to start.

Zamenhof, according to O’Keeffe, worked and smoked himself to death in Warsaw during the war. Only in his last days did he get a glimmer of good news — the February Revolution (which preceded the more well-known October Revolution) began just a few days before his death. O’Keeffe’s is the first mention I have seen of Zamenhof’s positive reaction to the revolution.

O’Keeffe shows how the period between the February and October revolutions inspired Esperantists in Russia to promote the importance of Esperanto for international socialism and mutual understanding between workers. During this interlude, many workers and socialists came to Esperanto in Russia out of revolutionary zeal, while many of the earlier “bourgeois” Esperantists began to lose prominence in the movement.

Then came the October Revolution in which the Bolsheviks came to power. As their control tightened, many Esperantists joined the Bolshevik party and oriented their promotion of Esperanto around the dominant ideology and the needs expressed by the Soviet state.

In the first years after 1917, the Bolsheviks hoped to inspire a series of revolutions around the globe. In order to promote such revolutions, the Bolsheviks launched the “Communist International” (Comintern) in 1919 as a break from the earlier “Socialist International.”

O’Keeffe devotes a good deal of attention to the problems of language, translation, and interpretation in the early meetings of the Comintern. I found this description very interesting just from a technical/linguistic point of view.

Up to that point, German had been the “lingua franca” of the socialist movement. All of the leading socialists in any country were judged, in part, by their ability to express themselves in German, and secondarily in other Western European languages such as French or English.

The difficulties in interpretation inspired one delegate to propose the adoption of Esperanto. This effort spawned a half-hearted commission to explore

auxiliary languages, which stalled and was ultimately fruitless.

By the mid-1920s, the Soviet state was becoming much more focused on its own survival and stabilization as a state. The Soviet Esperantists switched course, and began promoting the utility of Esperanto in new ways: for “citizen diplomacy” via letter writing with workers and activists in other countries; for the acquisition of technical knowledge, blueprints, and other know-how in the drive towards industrialization; and in support of a mass campaign to teach Western languages.

The connections between Soviet and foreign Esperantists is particularly interesting. One of the big draws for ordinary Soviet citizens to learn and practice Esperanto was the opportunity to cultivate pen pals across the world, even for someone who might never leave their province. The Soviet Esperanto Union (SEU) originally encouraged this correspondence as a way for Soviet citizens to tell the truth about Russia and bypass lies of the foreign capitalist press. Soviet Esperantists found themselves in a semi-unique position of being able to talk directly about their lived experiences with friends and comrades abroad, with little censorship.

Of course the problem with being able to tell the truth directly, without any oversight, is that nobody knows which truth you are telling SEU’s solution was to make letter writing a “collective” process, even putting suggestions in their journals for how to respond to common questions.

During this period SEU’s leaders complained to Soviet officialdom about the unregulated correspondence, and about the independence of the international worker-Esperantist movement from Soviet domination. As O’Keeffe points out, these actions tragically contributed to eventual doom for the Soviet Esperanto movement. If Esperanto allowed for uncensored exchanges through which dangerously critical ideas could enter the country, then from the perspective of the Soviet bureaucracy, the language was a problem to be dealt with.

As Esperanto was increasingly sidelined in the Soviet Union, SEU’s leaders grasped for legitimacy. They engaged in debates about the future “language of

Communism” in which, as with genetics, art, or military science, the “correct” position was determined by whoever held Stalin’s favor at the time.

Beginning in 1935, Esperantists with pen pals in the Soviet Union began to notice that responses stopped coming. During the Great Terror, anyone with knowledge of a foreign language or international connections was suspect. One leading Esperantist “confessed” that Esperanto was being used to organize a spy ring; several of the other leaders he named then also “confessed.” We know what followed ...

O’Keeffe does an excellent job showing Esperanto’s rich and dynamic life and place in Russian society between 1887–1937. Her book should bring increased academic attention to the social history of Esperanto and the overlooked importance of the “International Language Question.” There is also much for the contemporary Esperanto movement to learn from

and consider during our own tumultuous times.

[Additional notes are available in the online version of the article. —Ed.]

*Esperanto and Languages of Internationalism in Revolutionary Russia]. Brigid O’Keeffe. Bloomsbury Academic, 2021. Available June 17th from **Bloomsbury USA** <<https://bit.ly/34HZxu0>> and **Bloomsbury UK** <<https://bit.ly/3g5A15x>>. A **free preview** <<https://bit.ly/3yUPCif>> is available. Readers of *Usona Esperantisto* are eligible for a 35% discount on both print and ebook versions: use the discount code **ESPER21**.*



Brandon SOWERS

Brandon interesiĝas pri ligoj inter Esperanto kaj sociaj movadoj, kaj pri Esperanto en prizonoj. Li bonhavas logi provizore en Barbado, kie li ŝatas legi esperantajn librojn ĉe la plago.

bsowers@protonmail.com

Kolofono

Redaktoro/Editor: HOSS FIROOZNIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu inter proks. 500–1500 vortoj longaj. Prefere sendu materialojn retposte, kune kun via nomo, adreso kaj foto. Kun ĉiu aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri dato, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas havebla laŭ la permesilo CC BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed.eo>>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej frēsajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre reprezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj bv. legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; preferred length for an article is between 500–1500 words. Please send materials by email if possible and include your name, address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer along with subject(s), location, and date. We will return contributions received by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons license BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. As a courtesy, we ask that you wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors should consult the deadline calendar and style guide on our website.

La Espero

muziko • by Timothy BORONCZYK



Reskaŭ ĉiu esperantisto konas la himnon *La Espero*, kies vortoj devenas de la samnoma poemo de d-ro Zamenhof. La plej vasta kantata melodio estas verkita en 1909 de Félicien DE MÉNIL. Tamen ekzistas ne nur unu melodio – mi jam sciis, ke esperantistoj foje kantas la poemon laŭ melodio de Achille MOTTEAU, kiu estis verkita ses jarojn pli frue ol la de-menila melodio. Kaj ekzistas kelkaj aliaj. Sed kiom? Tion mi scivolis, do mi komencis esploron en 2018, en kiu mi malkovris preskaŭ dudek versiojn de *La Espero* verkitajn inter 1891 kaj 2020.

Bedaŭrinde nur kelkaj melodioj estas facile troveblaj en Interreto; la plej multon mi trovis per katalogo de iu arĥivo aŭ nacia biblioteko, kaj mi petis kopion. Ju pli da ekzempleroj mi kolektis, des pli forte mi deziris, ke la muziko ne estu forgesita. Tiu muziko apartenas al la kultura heredajo de nia movado; ĉiu himno staras kiel ekzemplo de muzika esprimado, inspirita de amo por Esperanto kaj credo je ĝia celo. La esploro ŝanĝigis al ne-atendita projekto: kolekti kaj re-gravuri la partiturojn por prezenti en muziklibro. (Mi ankaŭ kunlaboras kun ĥorestro de Esperanta ĥoro por sonregistri ilin, sed mi ne povas paroli multe pri tio, ĉar tiun laboron ni ĵus komencis).

Mi kaptas la okazon por redakti kaj plimodernigi la notacion dum la projekto. Interalie, mi korektas mistaktajn mezurojn, kaj koherigas interpunkcion kaj movajn markojn en la teksto (tiaj eraroj abundas en partituroj de la romantisma epoko), kion mi taktas necesa por plej bone prezenti la kolekton.

Ordigi la verkojn laŭ dato tuj videbligas du periodojn de vigla muzikverkado, kiujn mi nomas (ne tre kreeme) la “frua periodo” kaj la “nuntempa periodo”. La frua konsistas el verkoj de la fino de la 19-a jarcento kaj la komenco de la 20-a, kiu pli-malpli koincidas kun la malfrua periodo de romantismo. Rezulte, la muziko de tiu tempo estas verkita en la romantika stilo, aŭ stilo de salonmuziko aŭ nacia-sentiga muziko. La nuntempa periodo konsistas el verkoj, kiujn oni verkis je la fino de la 20-a jarcento kaj la komenco de la 21-a. La muziko de tiu tempo havas pli simplan formon kaj pli tutmondajn harmoniojn. Kompreneble, la limoj de la periodoj estas malprecizaj kaj dependas de perspektivo, kaj verkoj de interaj jaroj foje prezentas karakterojn de ambaŭ periodoj.

Mi suspektas, ke la malkresko de romantismo plejparte kontribuis al la malpligo de novaj melodioj por *La Espero* post la frua periodo. La muzika mondo cedis al la novaj ideoj de modernismo kaj la patriotisma sentigo de romantismo ne plu estis populara, do mankis deziro por himna muziko. Plie, salonmuziko malpli populariĝis danke al la alveno de la radio kaj gramofono; malpli da homoj kunvenis por distre muzikumi, do mankis bezono por tia muziko. Kaj la populareco de la melodio de DE MENIL certe malhelpis la deziron verki novajn melodiojn.

Tamen ankaŭ eblas, ke esperantistoj daŭris verki melodiojn por *La Espero*. Povus esti, ke iuj verkitaj inter 1914 kaj 1945 perdiĝis dum la mondmilitoj. Aliaj verkoj eble estas subpremitaj pro kopirajto. Ekzemple, mi trovis version de Andrzej KOSZEWSKI (1976) por du ĥoroj, sed la eldonejo ne plu akceptis eksterlandajn mendojn. Eĉ se mi ja povus mendi, mi ne rajtus prezenti ĝin en mia kolekto pro kopirajto. Kopirajto celas protekti la interesojn de verkistoj, sed samtempe ĝi malhelpas la disvastigon de la muziko – precipite se financa instigo mankas al la eldonisto por reklami ĝin.


Plej lastatempe, Viktoro SOLÉ verkis melodion kaj prezantis ĝin kun analizo de la de-menila melodio, unue dum la Kataluna Kongreso de Esperanto en 2015, kaj denove dum la Hispana Kongreso de

Esperanto en 2017. Ambaŭ prelegoj estas en YouTube: (***La Espero. Nova muzikpropreno*** <<https://youtu.be/PM8Shf5mYIM>> kaj ***Kial mi ne ŝatas la muzikon de La Espero*** <<https://youtu.be/f7IOGZmJMuY>>). Lech MAZUREK verkis melodion, kiu estis unafoje **prezentita dum la Pola Esperanto-Kongreso en Bjalistoko en 2017** <<https://youtu.be/03ifecZB9ys>>. Eble tiuj prezentajoj inspiros aliajn muzikemajn esperantistojn daŭrigi verkadon de novaj melodioj, kaj teĥnologio (kiel Interreto) kaj pli-liberaj permesiloj (kiel Creative Commons/Krea Komunaj) helpos, ke iliaj verkoj restu malkaŝataj. Vivu *La Espero*, ĉu?



Jen listo de melodioj, kiun mi kolektis. Mi petegas al ĉiu leganto, bonvolu kontakti min se vi havas partituron de ne-listigita melodio, por ke mi aldonu ĝin al la kolekto!

LA ESPERO	Claes ADELSKÖLD
LA ESPERO (du aranĝoj)	Achille MOTTEAU
HIMNO ESPERO	Henri DE COPPET
L' ESPERO	Antoon Jozef WITTERYCK
EN LA MONDON	Adela SCHAFER
L' ESPERO	Ronald G. TOMBLIN
LA ESPERO	Woldemar ZAKS
L' ESPERO	Le Monde Espérantiste (ULLY/BIZET)
LA ESPERO	Félicien DE MÉNIL
L' ESPERO	Samideanino
LA ESPERO	John F. H. WOODWARD
LA ESPERO	Oscar VAN SCHOOR
LA ESPERO	E. GREGORI
LA ESPERO	Natanael SVANHOLM
LA ESPERO	Andrzej KOSZEWSKI
LA ESPERO	Virk/Hector BENDA
LA ESPERO	Hellmut SERAPHIN
LA ESPERO	Alfredo ARAGÓN
LA ESPERO	Victoro SOLÉ
LA ESPERO	Lech MAZUREK
HIMNO DE ESPERO	Timoteo BORONCYK



Timothy BORONCYK

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas unu el la direktoroj de Esperanto-USA, estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel programisto.


tboronczyk@gmail.com

Piĝina parolo en dialektaj dialogoj

traduk! • by Hoss FIROOZNAIA

La rubriko *traduk!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas teksto en Esperanto por enangligi; en neparaj, teksto en la angla por elangligi. Leginte viajn respondeojn, ni prezentos resumon de la diversaj proponoj kune kun niaj reagoj, komentoj, kaj proponoj.

En tiu ĉi numero ni revenas al la teksto aperinta en N° 2021:1, eltiraĵo el la novelo *Three Vagabonds of Trinidad* de Bret HARTE. Ĝi prezentas plurajn defiojn, interalie la dialekton parolon de *Li Tee*. Mi gratulas kaj dankas al BA, CL, JH, NK, RN, kaj SB pro iliaj kreemaj kaj pensigaj proponoj.



Bret HARTE en 1872.

En Esperantujo ni ofte fanfaronas pri la esprimkapablo de nia lingvo, kaj prave: se lerte ekspluatitaj, la flekseblaj gramatiko kaj vortfarado povas redoni signifogamon same riĉan, kiel oni trovas en la etnaj lingvoj. Nia lingvo kapablas redoni ankaŭ diversajn gradojn de formaleco kaj klereco, ekzemple per vortoj ordinara juk fakaj, bonlingvaj aŭ neologismaj, frazoj simplaj aŭ plenaj je subfrazoj, ktp.

Sed kiam temas pri dialektoj kaj aliaj regione karakterizaj parolmanieroj, nia lingvo estas efektive *malriĉa*. Tiu manko estas parte intenca, ĉar Esperanto devas funkcii kiel interkompreneilo. Kaj ĝi estas parte neevitebla, pro nia relative mallonga historio.

Do kiel tradukanto redonu dialektojn en Esperanto? Ellaborinte sian novan lingvon per tradukado, Zamenhof estis kompreneble la unua, kiu alfrontis tiun defion. En 1906 li priskribis provon redoni la parolstilon de Osip, "malklera rusa servisto" en *La Revizoro*. (Vidu "Pri la Esperanto-stilo" en la libro *Lingvaj respondeoj*.) En la rusa originalo Osip parolas per "kripligitaj vortoj", do Zamenhof devis plejparte rezigni pri fidela redono; kripligitaj vortoj estus tro konfuzaj por la leganto – aparte en tiel frua verko de lingvo ĵus aperinta. Li strebis tamen "almenaŭ iom konservi" la stilon, uzante vortojn kiel *kartetoj*

anstataŭ *kartoj*, *registreto* anstataŭ *kolegia registratoro*, ks. Ĉu lia provo sukcesis? Eble ne tute, sed kompatinda Zamčjo ne havis bonajn alternativojn. Ne eblis prezenti nenorman sed facile kompreneblan lingvouzon en lingvo tiel nova, ke ankoraŭ mankis al ĝi bone konataj normoj ...

Unu relative facila maniero por ligi parolon al specifa regiono estas la uzo de akcentoj. Multaj jam konas la **komikan monologon de Duncan CHARTERS** <<https://youtu.be/bkJXREoeRaA>>, en kiu li konvinke imitas esperantistojn el diversaj landoj. Literature, Julio BAGHY estis frua pioniro pri akcentoj. En sia *Viktimoj* (1925) li prezentis Joĉjon, hungaron el Transilvanio, kies akcento ĉiam montras sian kamparan devenon. Kiam Joĉjo volas diri *Ĝus mi aŭdis tion de mia amiko*, ni legas: *Ĝos me aadis teon de meea ameekoo*.

Malgraŭ lia stranga prononcmaniero, tamen, la gramatiko de Joĉjo estas tute ordinara. Kontraste, la parolo de Li Tee montras ne nur akcenton, sed gramatike apartan dialekton. Multaj ĉinaj enmigrintoj al Kalifornio en la 19-a jarcento venis el la sudĉina provinco Gŭangdongo, do supozeble Li Tee uzas **la ĉinan piĝinangkan**

<https://en.wikipedia.org/wiki/Chinese_Pidgin_English>, komercan interlingvon unue aperintan en tiu provinco.

Kompreneble, piĝinoj kaj dialektoj apartenas al specifaj tempoj kaj kulturoj, kaj tial ne estas tute redoneblaj en traduko. Oni povas tamen krei similan impreson per imito de la fonologiaj kaj gramatikaj trajtoj. Ekzemple, en la parolo de Li Tee ni trovas la fonetikan ŝanĝon /r/ → /l/ (*woodpeckel*), simpligon de verboformoj, kaj mankon de gramatika distingo inter subjekto kaj objekto.

Oni povus imiti ĉiujn tiujn trajtojn, sed necesas ankaŭ iom da modero. Kiel leganto RN saĝe rimarkis en sia propono, fideleco al dialekti ne multe utilas, se ĝi igas la tradukon tro malfacila por legantoj. Ekzemple, antaŭ jaroj ni aperigis en la bulteno sudusonan popolrakonton, tre zorge tradukitan por redoni ĝiajn fonetikajn kaj gramatikajn apartaĵojn.

Kvankam genia, ĝi montriĝis eble *tro* fidela. Unu estimata leganto – membro de la Akademio, eĉ – reagis tiel: “Estas iom bedaŭrinde konstati, ke tiom baza eraro kiel duobla neo, kaj do ekz. ‘ne diras nenion’, dume devigas [min] flankenmeti la legaĵon.” Ho ve!

Do kiel Li Tee parolus en Esperanto?

La tradukintoj sekvis du malsamajn alirojn, ambaŭ pravigeblajn: unu grupo strebis redoni la sencojn de la vortoj en ordinara Esperanto; la alia diversgrade “kripligis” la lingvaĵon por imiti la originalon. Pripensu la jenan frazon, ekzemple:

Allee same Li Tee; me no changee. Me no ollee
China boy.

Kaj jen la proponoj, ordigitaj pli-malpli laŭ “ordinareco”:

Ĉion en ordo, mi estas Li Tee, mi estas tia kia antaŭe.

Ĉiam mi estas Li Ti. Mi ne ŝanĝigas. Mi ne estas alia ĉina knabo.

Tute same Li Ti; mi ne ŝanĝi. Mi ne alia ĉina knabo.

Ĉiam same Li Tee, mi ne ŝanĝass. Mi ĉinknabo.

Mi ĉiam samo Li Ti; mi ne ŝanĝi. Mi ne malsamo Ĉino kunabo.

M'esti sama Li Tee; mi ne ŝanĝi. Mi ne aljula ĉin'.

Menciindas, ke ankaŭ pri piĝinoj Baghy donis al ni belajn modelojn. En lia romano *Sur sanga tero* (1933) aperas la aminda *Lio Fu Peng*, ĉina bulkovendisto en rusa militkaptitejo. Li parolas la rusan nur fuſe, kaj Baghy provas redoni tian parolmanerion en Esperanto. Jen ekzemplo. Tre frue en la romano Lio Fu Peng flegas vunditan hundon. Responde al la demando “Ĉu via hundo?”, li diras:

Ne! ... Hundo ... hundo boji, kapitano pafi. Hundo ne apalteni al Lio Fu Peng. Lio Fu Peng esti ĉe la patlo kaj polti manĝaĵo al li. Kapitano veni, pafi, hundo molti.

Interesaj parolturnoj en la teksto

Oh! it's you, is it? — Jen frazo, kies signifo troviĝas

ne en la signifoj de la vortoj mem, nek en la sintakso, sed en socia konvencio. Efektive, la tuta frazo funkcias kiel leksika unuo kun propra signifo: familiara, iom petolema saluto. Sed Li Tee ne konas la konvencion, do li komprenas laŭvorte: “Ĉu vi estas vi?”

Ĉu ekzistas simila saluto en Esperanto? La tradukintoj pensis, ke jes, redonante *Ho, estas vi, ĉu?* kaj simile. Ĉiuokaze ne suficius pli rekta *Ho, saluton!* ĉar al tio la respondo de Li Tee ne havus sencon.

as if struck by some coincident recollection —

Ne nur la dialekteto de Li Tee pensigas nin pri komprenebleco. Ankaŭ la parolo de la Redaktoro estas malfacile sekvebla pro ĝia peza ornamajo kaj vagemaj subfrazoj. Ĉu oni simpligu por helpi la leganton? Kelkaj tradukintoj tion faris, redonante *kvazaŭ li ĵus memoris ion kaj kvazaŭ subite memorante ion*. Aliaj sendis pli laŭvortajn proponojn, ekzemple: *kvazaŭ frapita per ia koincida rememoro*.

like a conjuring trick — Oni diversmaniere redonis la ideon de magia artifiko: *kiel iluzio; kiel se magia lertaĵo; kvazaŭ magia artifiko; kvazaŭ magiaĵo*. Plej plaĉas al mi *prestidigate*, la propono de SB, ĉar ĝi bele elvokas la lertmovecon de *conjuring*.

the quick Californian soil — Kelkaj proponis *rapida Kalifornia grundo* kaj simile, sed mi iom dubas. Ĉu la metaforo estas internacie komprenebla? Finfine, rapida estas ne la humo mem, sed la vegetaĵoj, kiuj kreskas en ĝi. Aliaj proponis *fekunda tero/grundo de Kalifornio* kaj, pli figure, *la graveda grundo Kalifornia*.

painfully aware (of these regular persecutions) — kelkaj proponis la laŭvortan *dolare konscia* kaj simile. Sed *painfully* estas anglimo ĉi-kuntekste, signifante ne nepre “dolore”, sed “treege” – kutime en rilato al io malbona.

Leganto CL saĝe demandis, do, ĉu *dolore* vere konvenas. Laŭ PIV, *dolori* signifas “kaŭzi tre malagraban psikan impreson”, kaj ŝajne la Redaktoro vere havas tian impreson pensante pri la persekutoj de Li Tee. Do eble *dolore* estas en ordo. Sed plaĉas al mi ankaŭ la proponoj *tro bone sciis* kaj *treege konscia*.

(a radish) not of a sustaining nature — Oni interpretis tion diversmaniere: *restus mallonge; estus neniel daūrigiebla; ne estas eltenebla; ne povus esti impona.* SB eĉ proponis amuzan, kvazaŭ zamenhofan proverbon: *rafano sen klabo ne utilas dum rabo.* Tamen la signifo celita de Harte Ŝajne estas io alia: “tia, ke ĝi ne povas bone nutri/vivteni homon”, ĉu ne?

La “sinteza” teksto

Ne eblas glate kaj konsekvenco intermiksi la proponojn por la dialekta parolo. Do en la sintezo mi faris plian proponon por Li Tee surbaze de la jenaj principoj:

- ne uzu *-e* kaj *-n*
- nur *-i* por verboj
- konsonantgrupoj estu apartigitaj aŭ simpligitaj (se la rezulto restas komprenebla)
- *r→l; v→f*

Kiel ĉiam, mi ne proponas la sintezan tekston kiel modelon, kaj tradukdefio ne povas havi “ĝustan” solvon – kompreneble la jena temas nur pri propra, arbitra, kaj plene kontestebla gusto ...

“Ho! Estas vi, ĉu ne?” diris la Redaktoro.

La ĉina knabo, al kiu li direktis la figuran esprimon, komprendis laŭvorte, laŭ sia kutimo:

“Tuta sama Li Ti; mi ne ŝanĝi. Mi ne alia ĉina nabo.”

“Tiel estas”, diris la Redaktoro kun mieno de konvinkigo. “Supozeble ne ekzistas alia kobaldo kiel vi en la tuta konteo Trinidad. Nu, venontfoje ne restu tie ekstere, gratante kiel terrato, sed envenu.”

“Lasa fojo”, diris Li Ti senemocie, “mi flap-flapi. Vi ne ŝati flap-flapi. Vi dili: tutu sama dama pego.”

Estis vere: pro tio, ke la oficejo de “Trinidad Sentinel” situis en tre arbara ĉirkaŭaĵo – eta maldensejo meze de pinejo, kun ties akompana faŭno – tiaj signaloj estis facile konfuzebaj. Ankaŭ kapablo fidele imiti pegon estis inter la talentoj de Li Ti.

Senresponde la Redaktoro finis noton, kiun li estis

skribanta; je kio Li Ti, kvazaŭ trafita de iu koincida rememoro, levis sian longan manikon, kiu servis lin kiel pošo, kaj senzorge elskuis leteron sur la tablon kiel prestidigitisto. La Redaktoro, ĵetante al li riproĉan rigardon, malfermis ĝin. Ĝi estis nur ordinara peto de abonanto – iu terkultivisto – ke la Redaktoro “rimarku” gigantan rafanon kultivitan de la abonanto kaj liveritan de la portanto.

“Kie estas la rafano, Li Ti?” demandis la Redaktoro suspekteme.

“Ne hafi. Demandi usona nabo.”

“Kio?”

Tiam Li Ti degnis klarigi, ke kiam li preterpasis la lernejon iuj knaboj atakis lin, kaj en la luktado la granda rafano – same kiel multaj tiaj monstraĵoj el la fekunda kalifornia humo, nur amaso da organizita akvo – estis “kaĉigita” sur la kapoj de la atakantoj.

La Redaktoro, dolore konscia pri tiuj oftaj persekutoj de sia komisiito, kaj eble konstatinte, ke rafano ne taŭga kiel klabo ne havus nutran naturon, detenis sin de ajna riproĉo. “Sed Li Ti, mi ne povas rimarki tion, kion mi ne vidis”, li diris bonhumore.

Por tiuj, kiuj volas kompari la tradukojn kaj vidi ĉiujn detalojn, en la reta versio de la artikolo vi trovos paralelan prezenton de la propono.



La nova defio

Ĉar la pasintjara defio de Cory DOCTOROW montriĝis tiel populara, mi proponas ion simile buntan kaj moderne idioman. Ĉi-foje, tamen, temas ne pri komputiloj kaj interreta kulturo, sed, nu ... pri zombioj. La tekston mi adaptis el la romano *World War Z: An Oral History of the Zombie War* (2006) de Max BROOKS. (Atentu: aperas en ĝi kelkaj favoroj, kiuj – kvankam sufiĉe oftaj en ĉiutaga lingvaĵo – eble ne konvenas por ĉiuj legantoj.)

I know historians like to talk about how Yonkers represented a “catastrophic failure of the modern military apparatus,” how it proved the old adage that armies perfect the art of fighting the last war

just in time for the next one.

Personally, I think that's a big 'ole sack of it. Sure, we were unprepared. Our tools, our training — all one class-A, gold-standard clusterfuck. But the weapon that really failed wasn't something that rolled off an assembly line. It's as old as ... I don't know, I guess as old as war. It's fear, dude, just fear, and you don't have to be Sun freakin Tzu to know that real fighting isn't about killing or even hurting the other guy — it's about scaring him enough to call it a day. Break their spirit, that's what every successful army goes for, from tribal face paint to the "blitzkrieg" to ... what did we call it in the Gulf War, "Shock and Awe"?

But what if the enemy can't be shocked and awed?

Not just won't, but biologically *can't!* That's what happened that day outside New York City. The fact that we couldn't shock and awe Zack boomeranged right back in our faces. They're not afraid! No matter what we do, no matter how many we kill — they will never, ever be afraid!

Yonkers was supposed to be the day we restored confidence to the American people. Instead, we practically told them to kiss their ass goodbye.

La redakcio (trovu ĝian adreson en la kolofono) akceptos vian proponon **gis la 15-a de Septembro**. Ne necesas sendi plenan tradukon, se vi ne kapablas aŭ volas; ni akceptos ankaŭ fragmentojn. Sed ĉiuokaze bonvolu sendi **nur unu** proponon, ne plurajn diversajn provojn. Sukceson!

Mikronoveloj

Mikronoveloj estas ege koncizaj rakontoj, ofte malpli ol 300 vortojn longaj. Por nia mikronovel-o-rubriko ni aldonas kroman defion: rakontoj devas esti precize 100 vortojn longaj – nek pli, nek malpli. Ĉu vi emas verki tiel? Sendu viajn centvortajojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

Fajrobirdo

La majesta fajrobirdo flugis alte en la ĉielo.



“Ho, fajrobirda moŝto!”, petegis kamparano kiu vidis ĝin. “Ni malvarmas, kaj vintro venas. Ĉu vi bonvolus regali nin per via varmo? En nia domo bruliĝu fajro.”

La mita estaĵo jesis faligante flamantan plumon rekte en la kamentubon de la kamparano, kiu ĝojis danke.

Vidinte la okazintajon, iu najbaro kriaĉis siavice: “Hej! Birdo! Ankaŭ mian domon bruligu fajro!”

La besto faligis unu el siaj flamantaj plumoj rekte sur la pajlan tegmenton de la najbaro, kaj la domo cindriĝis postnelonge.

“Nu, ekde hodiaŭ li memoros kiel uzi *-ig* kaj *-iĝ*”, kontente pensis la fajrobirdo.

— Jorge Rafael NOGUERAS rafaeln@alum.mit.edu

Roberto

Finfine, pensis Roberto, mi havas la tutan domon por mi mem.



La edzino kaj la infanoj estis vizitantaj la bogepatrojn. Neniu estis krianta, la televidilo estis malŝaltita, kaj li aŭdis nur la mallaŭtan zumadon de la klimatizilo.

Post kiam la suno subiris, denove li ekĝojis, ĉar li povis enlitiĝi frue kaj dormi la tutan nokton. Kuŝante en la tuta lito (ne nur eta parto de la lito), li ridetis.

Turnante la kapon por rigardi tra la fenestro, Roberto momente ekvidis vizaĝon. Li palpebrumegis, sed la mistera vizaĝo estis jam malaperinta. Neridetante, lia propra vizaĝo paliĝis.

Roberto ne dormis tiun nokton.

— Vince ALLISON vinceallison@gmail.com

Peko

senintenca esperantajo • by Margo COHEN



Mmm, bongustaj pekoj!

Lastatempe, leganto Margo COHEN afable sendis al ni iom ŝokan reklamon por "Peko Peko Boxes", kiun ŝi trovis rete.

Post esplorado ni eksciis, ke la skatoloj enhavas ne pekojn ... sed dolĉaĵojn el Japanujo, de la firmao Fujiya. *Peko Chan* estas la nomo de ĝia ĉarma komiks-knabino, kiu aperas sur la skatoloj.

La vivo de Peçjo

ĝeroj • by Timothy BORONCYK



Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵoj de "Awesome Satyr". (Kaŝnomo, kompreneble. Timoteo klarigas, ke la artisto preferas resti anonima.)